

Unesko kaj Esperanto: omaĵo al Zamenhof



La 38-a Ĝenerala Konferenco de Unesko finiĝis la 18-an de novembro post dusemajna laboro en la sidejo de la monda organizaĵo en Parizo, kun la ĝojiga decido priomaĵi dron. Zamenhof, la iniciatinto de Esperanto, la ĝ raportis Gazetara Komunikado de Universala Esperanto-Asocio ĝe www.uea.org .

Kiel ruĝa fadeno tra ĝiaj diskutoj iris la 70-jariĝo de Unesko kaj la realigo de la Celaro 2030 por Daĝripova Evoluigo, sed en sia ferma parolado la Ĝenerala Direktoro s-ino Irina Bokova ne povis ne tuĝi la lastatempajn terorismajn atakojn, interalie meze de la konferenca periodo en Parizo mem: Tiu ĝi krima perfortaĵo trafas nin ĝiujn. ĝi atakas ĝion, kio estas plej kara al ni: libereco, homaj rajtoj, la digno de ĝiu homo, nia sento de aparteno al la unusama homaro.

Por esperantistoj la plej ĝojiga decido de la Ĝenerala Konferenco estas la envicigo de la 100-a datreveno de la morto de L.L. Zamenhof (14-a de aprilo 2017) inter 53 datrevenoj kun kiuj Unesko estos "asociita" en la periodo 2016-2017.

La propono estis farita de Pollando, kun subteno de Germanio kaj Slovakio. Temas pri plia rekono de Unesko al Zamenhof post tiu okazo de la 100-a datreveno de lia naskiĝo, kiam li estis proklamita unu el la grandaj personecoj de la homaro.

Universala Esperanto-Asocio, kiu havas oficialan statuson ĝe Unesko ekde 1954, estis reprezentita de kvar observantoj: Renée Triolle, François Lo Jacomo, Oleksandra Kovyazina kaj Nathalie So Yun Kesler. Hazarde samtage, la 5-an de novembro, kiam estis akceptita la aĝspiciado de la Zamenhof-datreveno, UEA havis tempon ĝe la budo por ne-registaraj organizaĵoj, ĝe kiu la UEA-representantoj povis disdoni informilojn kaj respondi demandojn pri Esperanto kaj la agado de UEA.



Radio Habana Cuba